
# DIA REGNO

DIA REGNO
ISSN 0167-9554

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (904) • 2014 •

# Karesmo

## Laetare






Mozaiko el 5 jc en la Preĝejo de Multobligo en Tabgha, Israelo,
la loko kie kredantoj kredas ke Jesuo per miraklo nutris 5 mil homojn per 2 fiŝoj kaj 5 panoj.
La okazaĵon oni tradicie memoras la 4an dimanĉon (Laetare) dum la karesmo.
Foto el Vikipedio

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420311241406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; 281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Moderna vivo - mondpaco | 3 |
| Stel-onjeto | 5 |
| Ĉerpoj el jarraporto de Verda Stelano-klubo /DR Kongo | 6 |
| Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, X | 8 |
| Pri kongresa apogo | 10 |
| La 20-a ekumena kongreso | 11 |
| Kontraŭ ventoj kaj tajdoj | 13 |
| IV internacia festivalo en Karlovo | 15 |
| Lukio Celio Firmiano Laktancio, II | 16 |
| Informetoj | 22 |
| ekumenaj Bibliaj Tagoj kun Adoru | 23 |
| Jen, esti hejme mia vol' | 24 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Kontrastoj diversspecaj ĉirkaŭas min ĉiutage, de vekiĝo ĝis ekdormo. Vidante televidajn novaĵprogramojn mi informiĝas pri grandskalaj diverstipaj; homaj, politikaj, ekonomiaj aŭ naturaj katastrofoj. Unu katastrofo ne finiĝas antaŭ alia komenciĝas. Kelkfoje ankaŭ videblas pluraŭ unuopaj homaj tragedioj, pli-malpli proksime.

Kontraste mi ĝojas kiam mi vidas nian infanon ludi kun geamikoj, kiam mi vidas iliajn evoluojn, iliajn feliĉojn kaj revojn. Espereble ili longe povos vivi en trankvilaj kaj pacaj cirkonstancoj. Ili esperas! Ĉu ni povas esperi?

Sed – ĉu ni nur esperu aŭ ĉu ni iamaniere ion fari por ke la estonteco estu pli bona? En la nuna Dia Regno vi trovas artikolojn kiuj pritraktas homojn kiuj siamaniere laboris por ke la mondo kaj homa vivo boniĝu. Mi deziras agrablan kaj pensigan legadon.

# Moderna vivo

## MONDPACO

Artikolo el Monato de Jomo IPFELKOFER

*Postaj tempoj eble pli bone komprenos min*

Max Josef Metzger

En la sama jaro, kiam Zamenhof publikigis sian internacian lingvon, naskiĝis en sud-orient-germana vilaĝeto Max Josef Metzger [maks jozef mecger]: 1887. Post lernejaj jaroj li studis katolikan teologion, doktoriĝis kaj laboris kiel vikario en hejma regiono.

Kiam Germanio deklaris militon kontraŭ Francio en aŭgusto 1914, la juna sacerdoto tuj patriotece sin registrigis kiel volontula militpastro. Kun la soldatoj li celebris mesojn kaj preĝis por ilia glora venko. Por liaj religiaj admonoj kaj subteno de la milit-entuziasmo li ricevis ordenojn. En 1915 li ĉeestis kruelajn batalojn en Francio, konsciiĝis pri la mortiga fataleco de milito. Samtempe li ege malsaniĝis kaj poste estis sentaŭga por militservo.

### Laborlingvo

En oktobro 1915 li translokiĝis al Graz, Aŭstrio, kiel ĝenerala sekretario de la Asocio de Abstinemaj Katolikoj, kaj fondis la Mondpacan Ligon de la Blanka Kruco, memorigante per nomo kaj simbolo je la Ruĝa Kruco. Baldaŭ li tie uzis Esperanton kiel oficialan laborlingvon. Ankaŭ de siaj kunlaborantoj li postulis, ke ili lernu la zamenhofan lingvon. Tiutempe multaj homoj esperis, ke ĝi baldaŭ iĝos vaste uzata vera mondlingvo.

Post la milito kaj la pactraktato de Versailles [versáj] Metzger estis la unua germana civitano, kiu oficiale ricevis la rajton publike paroli en Francio. Kaj li sekvis la inviton partopreni intertraktadojn preparantajn la fondiĝon de la Ligo de Nacioj, el kiu jardekojn poste sekvis Unuiĝintaj Nacioj. Dume tamen reprezentantoj de la katolika eklezio




Memortabulo pri Metzger en Berlin-Wedding.
Foto el Vikipedio

suspekteme observis liajn agadojn kaj publikaĵojn.

### Toleremo

Li – ne tute memvole – translokiĝis al la urbeto Meitingen en Bavario, Germanio, kie li daŭrigis sian laboron, gvidante la Asocion de Reĝo Kristo (Societas Christi Regis). En letero al papo Pio la 12a li proponis ekumenan koncilion. Li fondis la kristanan asocion Una Sancta, kiu postulis kaj preparis la reunuiĝon de katolika kaj protestanta eklezioj, kaj certe ankaŭ subtenis toleremon kaj kunlaboron inter ĉiuj aliaj religioj.

Venis tiranoj: Hitler kaj nazi-reĝimo. Metzger plurfoje estis arestita. En oktobro 1943 li estis kondamnita je morto en fia pseŭdoproceso gvidita de "furioza Rolando" (germane: rasender Roland – Roland Freisler, (vidu en eo.wikipedia.org/wiki/Roland_Freisler). Li estis skribinta kaŝleteron al tiama sveda episkopo de Upsala kun propono, post fino de tiu Hitler-milito, konstrui Germanion demokratan en unuiĝanta Eŭropo.

### Muzikaĵoj

Katenite Metzger atendis pli ol duonan jaron en karcera ĉelo, kie li skribis en malgrandegaj literoj sur la randoj kaj malplenaj paĝoj de Biblio, kiun oni permesis al li kiel solan legaĵon. Li verkis poemojn kaj komponis muzikaĵojn.

La 17an de aprilo 1944 oni gvidis lin el la ĉelo en la mortoĉambron, kie oni demandis pri lia nomo, oficiale kontrolis lian identecon kaj senkapigis lin per gilotino. La proceduro daŭris entute sep sekundojn – tiel oni zorge protokolis.

Okaze de la 65a datreveno de tiu mortigo okazis memorkunveno, kiun partoprenis diversaj organizaĵoj: katolika Pax Christi (paco de Kristo); sindikato de edukistoj kaj sciencistoj; alianco por homa digno; kaj Esperanto-lingvoklubo Augsburg. Interalie estis parolado ankaŭ en Esperanto: Max Josef Metzger "estis patro de la mondpaca movado", diris la parolanto, kaj "multflanke ekzemplodona, tiom bunta, ke ĉiu el ni speguliĝe sin retrovas".

### Filmo

Inter la partoprenantoj estis katolikaj pastroj, anoj de Asocio Reĝo Kristo, viktimoj de nazireĝimo, antifaŝistoj, sindikatanoj, politikistoj kaj esperantistoj. Eminentulo estis la holokaŭst-postvivanto Mietek Pemper, 89-jaraĝa, kiu konsilis la reĝisoron Steven Spielberg [stivn spilberg] dum la farado de la filmo Listo de Schindler [ŝindler] en Krakovo.

Post depono de florbukedoj la ĉeestantoj iris al la proksima kinejo Thalia, kie estis montrata filmo pri Max Josef Metzger, kiu adiaŭis el sia vivo per la vortoj: "Postaj tempoj eble pli bone komprenos min – ĉar estis ĉiam mia fatalo, ke mi antaŭis la tempon kaj tial ne povis esti komprenata".

Tiu ĉi artikolo povas esti libere kopiita aŭ tradukita por nekomercaj celoj, se oni mencias la fonton:
Artikolo de Jomo Ipfelkofer el Monato (www.monato.net).
Lasta adapto de tiu ĉi paĝo: 2009-07-01

# STEL-ONJETO

Julia SIGMOND, RO/IT

En la stelejo ĉiam estas granda la kur-rekuro. Ĉiuj prilaboras sian taskon.

Stel-onjeto estas la plej aĝa, kaj jam ŝi ne plu ricevas specialajn taskojn, sed ŝi ne scipovas nenifarante sidi. Dum la tuta tago ŝi kuretas-rekuretas, ĉiam trovante ion por fari.

Se nokte la stelidoj ekĝemetas, stel-onjeto tuj tie aperas, luletas, dorlotas ilin, ĝis ili reendormiĝas. Sed ankaŭ tiam ŝi ekaperas, se du batalemaj stel-knaboj kunfrapiĝas, kaj ŝia milda voĉo sufiĉas, ke ili repaciĝu. Nur stel-onjeto rimarkas la stel-knabinojn, kiuj pro iu bubin-problemo sekrete tristadas. Stel-onjeto tuj konsolas ilin kaj donas eĉ bonajn konsilojn.

Iun belan aŭtunan posttagmezon, post la tuttaga kuregado, stel-onjeto tre laca estis. Malfacile kaj tre malrapide elirante el la stelejo, kaj eksidante sur belan, ruĝan, falintan arbofolion, stel-onjeto feliĉe ĝuis la varmon de la aŭtuna suno. Por ŝia tre laca korpeto estis tre agrable ripozi. Stel-onjeto eble eĉ ekdormis.

Kaprica venteto eklevis la falintajn foliojn, iomete dancigis ilin en la aero, poste faligis ĉiujn en la proksiman rivereton. La bela, ruĝa folio, kune kun la aliaj folioj, iom da tempo naĝis sur la surfaco de la rivereto, ĝis akvokirleto subakvigis ilin ĉiujn.

Stel-onjeton neniu serĉis en la stelejo. Sed nokte, ĉiuj miris, kiam ekploretis la stelidoj, kaj neniu iris trankviligi ilin, kaj same oni miris, kiam la batalemajn stel-knabojn neniu provis repacigi, kiel ankaŭ la lamentantaj stelinetoj vane atendis la ĉiam konsolantan stel-onjon.

Mi konis similajn homojn, kiel stel-onjeto estis.

Ili dum la tuta vivo, modeste kaj milde, nek laŭdon nek rekonon atendante, plenumis sian laboron.

Nur post ilia malapero, pro ilia manko, oni eksentis, oni ekkomprenis, ilian ne anstataŭigeblecon.

Mi dezirus simili al stel-onjeto.

***Du Zamenhofaj proverboj pri fasto el* PROVERBARO ESPERANTA**

– Fasto kaj preĝo riĉecon ne donas.

– Post la fasto venas festo.

# Ĉerpoj el la jarraporto de Verda Stelano-klubo Rutshuru/DR Kongo

En nia orienta Provinco Kivu / DR Kongo, samkiel la disvolviĝo, la instruado daŭre restas problemo por pliboniĝo kvalite kaj kvante de la vivkondiĉoj. Pro la diversaj mezbonaj situacioj (malsekureco, militoj) kiujn ĝi konas depost 1994 la konga loĝantaro frontas fundamentan defion por plibonigi samtempe la instruadon kaj kamparan disvolviĝon.

La ĉefa celo de la klubo estas diskonigi la internacian lingvon – ESPERANTO – en nia teritorio, agante por la paco kaj por la disvolviĝo de nia loka medio, kaj precipe: Inicii la lokan loĝantaron al lernado de la lingvo Esperanto; bataladi kontraŭ la E-analfabeteco kaj por la trejnado de komputado; interesigi la loĝantaron pri la civitaneco kaj pacema kunvivado; promocii agro-kulturajn agadojn; starigi vilaĝan kason aŭ ŝparan kason.

VS-klubo celas disvolvigi siajn aktivecojn en la teritorio de Rutshuru. Tamen, laŭ eblecoj ĝi koncernas la tutan provincon.

Nia E-klubo aktivis siajn agojn de la 3a de marto 2013 en teritorio Rutshuru ĝis nun malgraŭ la daŭra milito, kiu iĝis ĉiutaga pano por orientanoj el Kivuo.

Nuntempe pro la milito ni havas nur 18 lernantojn.

Kompreneble nia klubo interagas en edukado kaj zorgas pri la ŝpara kaso. Aliaj aktivecoj ne funkcias plu pro la manko de ebleco kaŭzita pro la militoj ĉiutagaj en nia orienta regiono Kivu. Nia E-instruisto Honoré daŭrigas helpi iujn ajn pri E-instruado. Li jam enkondukis Esperanton en nia instituto Béthanie de la 2a de sept. 2013. Tiuj lernantoj bone ĉeestis(as) ĝin. Ĉi tiu lernejo havas jam kvar klasojn, baza kaj mezlernejo po du klasoj. Venonte aldoniĝos tri aliaj. Nia celo estas diskonigi nian lingvon de paco al ĉiuj.



La Kivu provincoj en DR Kongo

En aprilo 2013 ekis en Rutshuru distrikto la milito inter la ribelantoj de la movado M23 kaj la konga armeo, en Rutshuru en aprilo, majo, junio, julio la milito forpelis nin, multaj perdis siajn aĵojn, aliaj estis rabitaj, aliaj mortigitaj, aliaj seksperfortitaj, ktp. Multaj fariĝis malriĉuloj...

En julio la 25an 2012, finfine tiu movado M23 venkis kaj akaparis nian

tutan teritorion. La konga registaro ne havis vorton en nia loko. De tiu dato ĝis la 5a de novembro 2013 nia tuta registaro konga venkis M23 kaj konkeris tutan distrikton. Kun tiu malsekureco ni ne ŝparis en kaso. Dum tiu varmega milito multe da enloĝantoj foriris, irante en najbaran landon Ugandon. Aliaj kvin samideanoj ĉiam estas fuĝantoj en tiu uganda rifuĝejo nomita Rwamwanja, suferantaj en tendaro. Ni pensas ke ĉiu mondo scias pri la vivo en tendaro.

Krom tio kion ni jam klarigis al vi, la vundeblaj kaj orfaj gelernantoj ne pagas regule siajn lernojarkostojn pro tiu kaŭzo. Eĉ trovi skribilojn, kajerojn, ne facilas por ili. Ĉi tiuj petas helpetojn pri tiuj materialoj, ĉar ili travivis malbonan kondiĉon lastjare.

Ĉu bonkoruloj povas kontribui iom por helpi tiujn fuĝantojn en rifuĝejo kaj al lernantoj vundeblaj kaj orfaj ?

### Estas petita materialo por nia instituto Betanio

660 kajeroj, 300 skribiloj por tiuj viktimoj – venontaj esperantistoj – (lernantoj) se al iu eblos helpi nature oni povos poŝtigi skatolojn da lerniloj per poŝte jam menciita. Neniu povos ŝteli la kovertojn.

### Plano por jaro 2014

Kiel ni jam klarigis en nia teksto pri celo kaj objekto, nia E-instruado ne ĉesos antaŭenigi Esperanton ĉie malgraŭ la malsekureco kiu ofte skuas nin. Tio estas, kiam ni eklernis ĝin en 2009, ni komprenis, ke ni eniris plaĉe utopian mondon, kie ideoj havas valoron, kaj ni restis... Esperanto estas por ni lingvo tre alternativa, kaj en nia mondkoncepto ĝi iras absolute samtakte kun aliaj aferoj minoritataj, kiujn ni tamen taksas tre gravaj, ekzemple ekologio. Kiam ni aŭdas la vorton Esperanto ni sentas admiron, flugon, inspiron kaj ĝojon.

Tamen de januaro 2014-2015, estos grave por ni varbi aliajn E-partianojn.

Ni projektas 150 USD por komunikoj tra nia loka radio, gluado de E-flugfolioj tra publikaj lokoj. Ni konsciigos partianojn monkontribui por ke ni atingu tiun sumon por sukceso kaj atingi la celon.

### Dankesprimoj

Ni dankas sinjorojn Herman Deceuxninck el Belgio, Gian Savio el Israelo, Hans el Nederlando, Tadeo Kopec el Pollando, kiuj sendis lernilojn (kajerojn, skribilojn, krajonojn, viŝgumojn ktp) por gelernejanoj vundeblaj kaj orfaj el Instituto Betanio.

Prezidanto de E-Klubo:
Honoré SEBUHORO.
Uea -kodo: hose-t
rete: honsebn@gmail. com

Verda Stelano -Klubo
PO BOX 08 BUNAGANA
KISORO UGANDA.
Rete:vsklubo@gmail. com

Sekretario: Prime Nsabimana
Kasisto: Anita Dusabe
konsiloj: Innocent Baraka, Ian Kabunga

# Skizoj pri filozofoj-kuracistoj, X

## Kastelo en Wartburg – Sankta Elizabeta

DUDICH, Endre, HU

*Ĉu ankaŭ virinoj? Jes, sed alimaniere*

### Sankta Elizabeta de Hungario

1. Kurta kaj kruta vivo

En la jaro 1207, en la nordorient-hungaria kastelo de Sárospatak, naskiĝis Elizabeta, filino de la reĝo de Hungario Andreo la 2-a de la dinastio de Arpadoj, kaj Gertrudis de Andachs el Meranio. Ŝi estis nur kvar jarojn aĝa, kiam Hermano la 1-a, grafo de Turingio, proponis edzinigi ŝin al sia filo Ludoviko. La knabino estis portita al la grafa kastelo Wartburgo. La edziĝo okazos dek jarojn pli poste, kiam Elizabeta havis jam 14 jarojn.

Elizabeta kaj Ludoviko havis tri idojn. Ili estas Hermano (1222), Sofia (1224), kaj Gertruda (1227). En 1227 Ludoviko aliĝis al la krucmilita armeo. Sed jam en Italio li malsaniĝis, kaj mortis en Otranto.

Hermano heredis la grafan titolon kaj la bienojn de Ludoviko, Sofia iĝis princino de Brabanto, kaj Gertruda – estrino de la monaĥinejo de Altenburg.

La vidvino Elizabeta estis devigata de la nova grafo Konrado forlasi la kastelon de Wartburg. Vivaĉante en urbo Eisenach ŝi aliĝis al la terciara ordeno de la Franciskanoj, kaj laŭ ordono de sia ekstreme severa konfesprenanto Konrado de Marburgo votis malriĉecon. La patro, reĝo Andreo la 2-a, aŭdis pri la malfacila sorto de sia filino, kaj sendis delegitojn por hejmenporti ŝin, sed ŝi firme rifuzis.

Tamen Elizabeta almenaŭ akceptis iom da mono de sia patro, kaj setlis en Marburgo. Tie ŝi konstruigis malsanulejon, ĉefe por lepruloj. Ŝi mem servis tie kiel flegistino. La tro aŭstera vivo baldaŭ elĉerpis ŝian vivenergion, kaj Elizabeta forpasis la 19-an de novembro 1231, en sia 24-a vivojaro.

S:ta Elizabeta, skulptaĵo de la 16 jc. Musée de l'Œuvre Notre-Dame, Strasbourg, France



2. Glora postvivo

Jam en 1234 komenciĝis la procedo de kanonizado de la "patronino de la lepruloj". 59 mirakloj estis registritaj en la protokoloj. Pentekoste de 1235 papo Gregorio la 9-a en Peruĝio deklaris Elizabetan sanktulino, kaj en 1236 ŝiaj teraj restaĵoj estis solene "metitaj sur la altaron" en Marburgo, en la gotika preĝejo, kiu ekde tiam portas ŝian nomon.

Krom la katolikoj, ankaŭ la luteranoj respektas Sanktan Elizabetan. Ekzemple ankaŭ la preĝejo kie restas la hungara humanisto Andreo Dudith, en Wroclaw, estas dediĉita al ŝi.

Unu jarcenton pli poste, en 1338, la pli juna filino de Elizabeta, Gertruda, iĝis deklarita beatulino.

Notindas, ke la dinastio de la Arpadoj produktis ankaŭ duan Sanktan Elizabeton! Ŝi estis filino de la lasta Arpad-dinastia reĝo, Andreo la 3-a, kaj ŝi vivis kaj mortis en la monaĥinejo de Töss en Svislando (1291-1338).

## La historia fono – la unua duono de la 13-a jarcento

1200 Fondiĝas universitato en Parizo.

1201 En Oksfordo fondiĝas teologia altlernejo, rapide evoluonta je universitato.

1204 La krucmilita armeo okupas Bizancon kaj estigas la t.n. Latinan Imperion.

1205 Andreo II de la Arpadoj iĝas reĝo de Hungario.

1211 La mongoloj de Ĝengis kan trairas la Grandan Muron de Ĉinio.
Francisko de Asizo fondas monaĥan komunumon.

1213 Malkontentaj hungaraj nobeluloj mortigas Gertrudison de Meranio, edzinon de reĝo Andreo II.

1214 Papo Inocencio III proklamas krucmiliton kontraŭ la Albigensoj / Katharoj en Suda Francio.

1215 Dominiko Guzmán fondas la almozulan ordenon de Dominikanoj.
Reĝo Andreo II elpelas la Teŭtonan Kavalirordenon el Transsilvanio.
Johano II la Senlanda, reĝo de Anglio, devas subskribi la dokumenton *Magna Charta.*

1217 Reĝo Andreo II gvidas krucmiliton al Palestinio.

1220 Papo Honorio III kronas Frederikon II imperiestro.

1222 Reĝo Andreo II eldonas la *Oran Bulon* (pri la privilegioj de la nobeluloj).

1223 Papo Honorio III aprobas la Regularon de la ordeno de Franciskanoj.

1224 Reĝo Andreo II eldonas la Grandan Privilegion de la Saksonoj (*Andreanum*), la unuan dokumenton en Eŭropo pri regiona aŭtonomio.

1226 Ludoviko VII, reĝo de Francio, venkas la Albigensojn.

1229 Imperiestro Frederiko II okupas Jerusalemon.

1230 La altlernejo de Kembriĝo atingas la rangon de universitato.

1231 Papo Gregorio IX komisias la Dominikanojn direkti la *Inkvizicion* por identigi kaj aresti la herezulojn.

1235 Béla IV sekvas Andreon II sur la trono de Hungario.

1236 La Franciskana monaĥo Juliano revenas el la regiono de Volgo, ektrovinte Grandan Hungarion.

1239 La mongola-tatara armeo de Batu kan venkas la Rusojn.

1240 La armeo de Batu kan venkas la Polojn kaj okupas la urbon Kiev.

1241 La armeo de Batu kan venkas la Hungarojn ĉe Muhi.

1244 La Turkoj okupas Jerusalemon.

1250 Roberto de Sorbon reorganizas la universitaton de Parizo.



# Apogo por partopreno en la ekumena kongreso

IKUE kaj KELI organizos denove ekumenan kongreson ĉijare en Italio, Trento. KELI kongresoj plej ofte okazas en iu orient-eŭropa lando pro pli malaltaj kostoj. La estraro de KELI forte ŝatus, ke multaj KELI-anoj povu partopreni nian ĉijaran ekumenan kongreson, kaj neniu hezitu la ĉeestadon nur pro ekonomiaj kaŭzoj.

Pro tio la estraro decidis ke:

ĉiuj KELI-anoj rajtas peti bezonatan apogon al la kongres-kotizo, maximume 150 eŭrojn po persono laŭ la jena regularo:

Tiu, kiu en la lastaj kvin jaroj partprenis

- kvin KELI-kongresojn – 150 EUR
- kvar KELI-kongresojn – 120 EUR
- tri KELI-kongresojn – 90 EUR
- du KELI-kongresojn – 60 EUR
- unu KELI-kongreson – 30 EUR

Estas ankaŭ kondiĉo, ke la membro-kotizo de KELI estu pagita (plej malfrue en Trento).

ATENTU!
La apogo de la kongres-kotizo NE estas aŭtomata. Kiu bezonas tiun ĉi helpon, devas kontakti la kasistinon de KELI (vidu la kontakteblecojn sur paĝo 2)!

GRAVA PETO!
La estraro petas, ke nur tiuj petu apogon, kiuj bezonas helpon – kaj ke tiuj, kiuj bezonas helpon, vere petu apogon.

*La estraro*

# LA 20-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

## 67-a IKUE-Kongreso ● 64-a KELI-Kongreso

## Trento - Cadine, Italio, de la 16-a ĝis la 23-a de aŭgusto 2014

*Temo: Ĉu Kristo estas dividita? (I Kor I,I3)B*

IKUE kaj KELI invitas la Kristanan Esperantistaron al 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Trento, Italio. La urbo situas en norda ltalio ĉe la landlimo kun Aŭstrio kaj estas facile atingebla per aŭtoŝoseo kaj per trajno.

Ĉi tiu urbo en la jaro 1542 estis elektita kiel sidejo de la tielnomata Koncilio de Trento (1545-1563), per kiu oni klopodis reunuigi la kristanajn Ekleziojn post la protestanta Reformacio. Kiel sciate, ĝi ne atingis la celon, sed ĝi kontribuis al la reformado de la Katolika Eklezio. Pro tiuj historiaj kialoj, la papo Paŭlo la 6-a konfidis al la Diocezo de Trento apartan taskon al la ekumena agado.

La urbo estas riĉa je vidindaĵoj naturaj, historiaj kaj monumentaj. Starigita en la valo de la rivero Adige [pr. A'dige], ĝi estas ĉirkaŭata de altaj montoj. Nia kongresejo estos ĉe ”Centro Mariapoli” en Cadine [pr.: Ka'dine], vilaĝo en la komunumo de Trento, sed iom for de la urbocentro kaj meze de la montaro, tamen facile atingebla per aŭtobuso (lokaj esperantistoj estos pretaj helpi ĉe la stacidomo). Centro Mariapoli [pr.: Centro Maria'poli] estas ekumena Centro de “Movimento Focolari” (Movado de la Fajrujoj), kiu multe agas favore al la interreligiaj rilatoj.

La devizo de la temo de nia kongreso estas tiu jam adoptita por la Semajno de Preĝoj por la Unuiĝo de Kristanoj 2014: “Ĉu Kristo estas dividita?” (1 Kor 1,13) kaj la temo estos precipe pritraktita laŭ la letero al la Efezanoj (4,1-6), en kiu la malliberigita apostolo Paŭlo strebas por la unueco (“estas unu korpo, unu Spirito unu espero unu Sinjoro, unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj ...”). Tiaj estu ankaŭ niaj sentoj.

<u>Klarigo al la suba tabulo:</u>
Kongresaj kotizoj (en eŭro):
<u>Tarifo A:</u> iamaj socialismaj landoj, Azio, Afriko, Latina Ameriko, Oceanic.
<u>Tarifo B:</u> Ĉiuj landoj ne inkluzivitaj sub A.

* Du subtegmentaj ĉambregoj kun banĉambroj kaj necesejoj komunaj.
Ĉiuj aliaj ĉambroj havas sian propran banĉambron.

| Kategorio | A | B |
|---|---|---|
| Kongresa kotizo ĝis la 30a de majo . . . . . . | 20,00 € | 50,00 € |
| De la 1a de junio . . . . . . | 40,00 € | 70,00 € |
| *(Infanoj ĝis 10 jaroj aliĝas senpage)* | | |
| 1-lita ĉambro | 460,00 € | 480,00 € |
| 2/3/4-lita ĉambro | 290,00 € | 420,00 € |
| 16-lita ĉambro * | 210,00 € | 250,00 € |

La kongreso komenciĝos la 16-an de aŭgusto posttagmeze kaj finiĝos la 23-an matene; la prezo inkluzivas:

- 7 tranoktojn, 7 matenmanĝojn, 6 tagmanĝojn, 7 vespermanĝojn,
- bustransporton dum pilgrimado kaj necesajn enirbiletojn.

Por la ne-loĝantoj: tagmanĝo: 15 EUR; vespermanĝo 15 EUR
**Notu bone:** La aliĝo validos nur post la alveno de la antaŭpago de la kongresa kotizo.

## PAGMANIERO:

BANKO: IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000
BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX
adreso: Unione Internazionale Cattolica Esperantista;
Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA-RM ( Italia)

UEA konto: "ikue-v" de Intemacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo
**Atentu**:

- Ne FORGESU skribi la kialon de la pago.
- En la adreso ne uzu la mallongigon IKUE.
- Eŭropaj bankoj aliĝintaj al sistemo "SEPA" ne postulas komisiojn por alsendi la monon.

## ĜENERALAJ AVERTOJ:

- La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝo kaj de la aliĝkotizo
- Ĉiuj aliĝintoj ricevos konfirmon pri la aliĝo kaj informon kiel atingi la kongresejon
- Post ricevo de la mendo la organizantoj tuj komunikos, ĉu la loĝ-aranĝo elektita estas jam plene okupita.
- Por la plur-litaj ĉambroj, se en la aliĝilo ne estas indikitaj la nomoj de la kunloĝantoj, oni kunloĝigos virojn kun viroj kaj virinojn kun virinoj.
- En kazo de ne alveno la aliĝkotizo ne estos redonata
- Reston de la sumo oni povas pagi al la banka konto, aŭ surloke nur per kontanta mono (ĉekoj kaj kreditkartoj ne estos akcepteblaj).
- Oni povas plenigi kaj sendi la aliĝilon rekte per retpoŝto el la retejo: www.ueci.it/EEKalighilo/
- Dum la kongeso ni preĝos per la libro ADORU. Nepre kunportu ĝin.
- Por kontakti la organizantojn skribu rete al: eekongreso@gmail.com aŭ per ordinara poŝto al: Unione Esperantista Cattolica Italiana via Lombardia, 37; 1-20099 Sesto San Giovanni (Italio)

## KONGRESA PROGRAM-SKIZO:

*Sabato, 16:* Dumtage: akcepto de la kongresanoj. Vespere: Inaŭgura vespero.
*Dimanĉo, 17*: Sankta Meso, Evangeliana kaj Ekumena Diservoj, Solena malfermo.
*Dumsemajne:* ĉiutage: Sankta meso, komuna kantado, ekumena preĝo, prelegoj. Vizito de la urbo kaj ĉirkaŭaĵoj.
*Merkredo, 19:* Tuttaga ekskurso (loko difinota).
*Vendredo, 22:* Vespere: adiaŭa vespero.
*Sabato, 23.:* Adiaŭa mateno.

**!** La aliĝilo estas akirebla per retadreso keli.chez.com/AligxiloEEK_2014.pdf aŭ ĉe la sekretario Pavel Polnický (vidu la adreson sur paĝo 2)

# Kontraŭ ventoj kaj tajdoj, la eklezio en Ĉinio multe kreskas

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Mi raportas pri la situacio de la Kristana Eklezio en Ĉinio. La evangeliaj misiistoj komencis labori en Ĉinio dum la unua parto de la jaroj 1800. En la jaro 1900, okazis la “Boksista Ribelo”. Dum tiu tempo, 236 alilandaj misiistoj kaj 23.000 ĉinaj kristanoj estis kruele mortigitaj. Malgraŭ tiu buĉado, miloj da misiistoj alvenis al Ĉinio post la Boksista Ribelo. Ili establis 19 universitatojn, 6.000 elementajn kaj duagradajn lernejojn, kaj pli ol 900 malsanulejojn. Kiam la komunistoj ekkaptis la potencon en la jaro 1949, 10.000 alilandaj misiistoj laboris en Ĉinio kaj estis 700.000 ĉinaj kristanoj.

La komunistoj senprokraste klopodis detrui la kristanan influon en la tuta lando. Miloj da preĝejoj estis fermitaj; la kristanaj lernejoj, universitatoj, kaj malsanulejoj estis fermitaj aŭ ekregitaj de la komunistoj. La alilandaj misiistoj estis elpelitaj. En la jaro 1953, la malmultaj misiistoj kiuj restis en la lando estis en malliberejoj aŭ koncentrejoj. La komunistoj mortigis milojn da ĉinaj kristanoj kaj pastroj. Aliaj miloj da kristanoj kaj pastroj suferis dum jardekoj en malliberejoj kaj koncentrejoj.

Ne nur la kristanoj sed la tuta ĉina popolo suferis pro la stultaĵoj kaj kruelegaĵoj de la komunistoj. Ekzemple, Mao Zedong decidis ke la birdoj estis konsumantaj tro multe de la rikolto. Li ordonis ke la tuta popolo tage kaj nokte batu potojn kaj kaserolojn por ke la birdoj ne povu dormi. Tiu agado sukcesis; miloj da birdoj falis mortintaj. Sed, pro tio, la vermoj kreskis kaj konsumis grandan parton de la rikolto. Multaj ĉinoj mortis pro malsato.

Mao Zedong faris alian brilan planon: “La Granda Salto Antaŭen”. Ĉiuj ĉinoj devis konstruí fornojn en siaj kortoj por fandi feron. La komunistaj estroj sekvis la ekzemplon de sia “Granda Direktilisto”, kaj ili kuraĝigis la ĉinojn ke ili fandu siajn kuirajn kaj rikoltajn ilojn. Dum la ĉinoj fandis senutilan feron, ili malzorgis la rikolton. La Granda Salto Antaŭen iĝis La Granda Salto Malantaŭen, kaj konsekvence miloj da ĉinoj mortis.

Mao Zedong ellasis la “Kulturan Revolucion” sur Ĉinion. Ĉiu agrikultura kaj industria agado haltis dum la “Ruĝaj Gardistoj” furioze sturmis tra la lando. Ankaŭ la lernejoj kaj la universitatoj estis fermitaj. Ekzistís granda malsato kaj eĉ okazis kanibalismo. En unu ĉina urbego, oni vidis oficiston de la Publika Sekureca Buroo kiu piediris tra la straton portantan kruron de viktimo

(ankoraŭ en peco de pantalono) sur la ŝultro. Li portis ĝin hejmen por la tagmanĝo! Kelkfoje, kamparanoj allogis urbanojn per promesoj vendi al ili nutraĵon. Sed en tiuj kazoj, la urbanoj estis la nutraĵo!

Laŭ esplorado farita por usona senata komitato, la komunistoj kaŭzis la morton de 60 milionoj (60.000.000) da ĉinoj. Ĉe la komunistoj, ofte ne sufiĉis mortigi siajn viktimojn per malsato aŭ kugloj. Kelkfoje, la kondamnitaj personoj devis fosi siajn proprajn tombojn kaj tiam ili estis entombigitaj vivaj. Alifoje, la viktimoj estis ligitaj al kvar ĉevaloj kaj ili estis dispecigitaj kiam la ĉevaloj estis dispelitaj en diversajn direktojn. La komunistoj ankaŭ lasis fali siajn viktimojn kelkfoje de alteco de 5 metroj ĝis ili mortis. (La komunistoj ne faris tiajn kruelegaĵojn nur en Ĉinio. En la jaroj 50-aj, mi renkontis germanan knabinon kies familio eskapis el la Sovetunio dum la Dua Mondmilito. La familio estis el grupo de evangeliaj germanoj kiuj loĝis en Rusio dum multaj generacioj. Unu tagon antaŭ la milito, komunistaj soldatoj alvenis al la domo de tiu familio. Ili amasigis la meblojn en la familia ĉambro. Tiam ili devigis la patron supreniri la meblojn. Iu ano el la familio estis devigita forpreni meblon por ke la patro falu malsupren. Tio estis ripetita ĝis la patro mortis.)

La kristanoj en Ĉinio kiuj ne estis mortigitaj aŭ malliberigitaj ofte estis publike hontigitaj. La komunistoj devigis ilin aperi antaŭ tribunaloj kie ili estis mokitaj kaj batitaj. La komunistoj ne ĉiam sukcesis humiligi la kristanojn. Iun tagon, grupo de komunistaj oficistoj iris al kristana vilaĝo kun la celo hontigi la pastron. Sed kiam ili alvenis al la vilaĝo, ili renkontis la pastron kiu puŝis la "mielan vagonon". (Oni kolektis homajn ekskrementojn en tian vagonon por fekundigi la kampojn). La komunistoj flankeniĝis pro la aĉa malodoro, kaj ŝanĝis sian pozon. "Kial vi, la ĉefo de la komunumo, povas fari tian aĉan taskon?," ili demandis. La pastro respondis: "Kiel ĉefo de la komunumo, tio estas mia privilegio fari ĉi tiun taskon." La komunistoj ne povis hontigi la pastron plu kaj ili foriris hontigitaj!

Mao Zedong mortis en la jaro 1976. La kristanoj kaj pastroj kiuj supervivis jardekojn da suferado en malliberejoj kaj koncentrejoj komencis eliri kaj reveni hejmen. La kristanoj kiuj estis praktikintaj sekrete sian fidon dum la terura tempo de la "Kultura Revolucio", komencis proklami la evangelion. Kristanaj evangelistoj iris de vilaĝo al vilaĝo predikantaj. Ofte, mirakloj okazis kie ili predikis. Ofte kiam miraklo okazis, la plej granda parto aŭ la tuta vilaĝo konvertiĝis al Kristo.

Ĉar la oficiala eklezio estis/estas regata de ateistaj komunistoj, plejparte la kristanoj organiziĝis/organizaĝas en "domaj preĝejanaroj". La komunistaj oficistoj ege klopodas haltigi la etendiĝon de la kristana fido. Ili arestas kristanojn, batas ilin, malliberigas ilin, kaj eĉ mortigas ilin. Tial la situacio estas tre malfacila ĉe la komunistoj. Rigardu: du kristanaj fratoj estis alportitaj antaŭ komunistan oficiston. La akuzo kontraŭ

ili estis ke ili preĝis por la malsanuloj. “Jes”, ili respondis. “Ni preĝis por najbaro kiu suferis pro kancero de la stomako kaj la Sinjoro Jesuo resanigis lin.” La pozo de la oficisto ŝanĝiĝis: “‘Knaboj’, bonvolu preĝi por mi. Ankaŭ mi suferas pro kancero de la stomako.” Kiu defendo ekzistas kontraŭ la potenco de Kristo?

En la jaro 2002, la komunista registaro de Ĉinio proklamis ke eble restis 15.000 kristanoj en la lando. En tiu tempo, estis proksimume 70.000.000 (70 milionoj) da kristanoj en la lando! Nuntempe, la “problemo” de la kristana fido kreskas tiel, ke la komunistoj estas devigataj esti pli honestaj. En februaro de 2011, alta oficisto de la registaro publike konfesis ke jam estas 120.000.000 (120 milionoj) da kristanoj en Ĉinio!

Tiel la evangelio de nia Savanto ĉiam marŝas antaŭen kaj triumfas.

☙

---


## IV:a Internacia festivalo de E-kanto, Recitado, Oratora konkurso

04 - 06 aprilo 2014, Karlovo, Bulgario

**Ekzemploj de temoj por la Oratora konkurso:**
ESPERANTO kaj la EŬROPA UNIO aŭ ESPERANTO en la literaturo kaj poezio aŭ TRADUKADO el nacia lingvo en esperanton kaj male aŭ ESPERANTO kiel familia lingvo aŭ ESPERANTO en INTERRETO.

**Tranoktado:** en komuna loĝejo aŭ en hoteloj.

**Aliĝkotizo:** 5 eŭroj por la partoprenontoj de la festivala programo; por gelernantoj kaj gestudentoj la aliĝkotizo estas 2 eŭroj; 10 eŭroj por gastoj

**Postfestivala Feriado ‘Karlova Printempo’, 6-14 aprilo 2014:**
Ripozado kaj ekskursoj al diversaj proksimaj urboj

**Limdato por aliĝo: 30.03.2014**

**Pli da informo kaj invitleteroj** por bezonotaj bulgaraj vizoj – kontaktu tuj kun la organiza komitato.

**Adreso por aliĝo kaj informoj**:
Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 ESPERINFORM

**Retadreso**: E-mail: leonov@rozabg.com (preferinde skribu rete)

**Telefonoj** : +359 885056469 (tage kaj nokte)
+359 335 9-39-33 kaj +359 335 5-50-50 (nur vespere)

**Sendu la aliĝilojn preferinde tuj aŭ ĝis 30.03.2014 !**
**Ni Atendas Vin En Karlovo !**

# Lukio Celio (aŭ Cecilio) Firmiano Laktancio

dua parto (la unua parto en numero 6/2013)

Gerrit Berveling, NL


El **La kolero de Dio**:

**10**:1 Tiuj, kiuj negas ke la mondo estis kreita de Dia providenco, diras, ke aŭ ĝi formiĝis el hazarda kuniĝo de atomoj[9], aŭ subite ekestis el la naturo, ĉar laŭ Stratono la naturo havas en si la forton naski aŭ pereigi, sed ĝi havas neniun senton nek figuron, tiel ke ni kredu, ke ĉio certasence estu formita el si mem, sen ia formanto aŭ kreanto. Ambaŭ estas vanaj, kaj neeblaj supozoj. 2 Sed tiel okazas al tiuj, kiuj nescias la veron, ke prefere kion ajn ili elpensu ol ke ili juĝu, kiel la racio postulas.

3 Unue ja: tiuj plej etaj atomoj, per kies kuniĝo ili asertas ke estiĝis la mondo, mi volonte sciiĝus, kie ili estas aŭ kie mi ilin serĉu? Kiu iam ajn vidis ilin? Kiu sentis? Kiu aŭdis? Aŭ ĉu nur Leŭkipo[10] havis okulojn? Ĉu nur li menson? Vere, li ja estis la sola el ĉiuj, kiuj estis blindaj kaj frenezaj, ĉar li diris tiajn aferojn kiujn neniu malsanulo povus eldiri, neniu dormanto povus elrevi.

4 Ke entute ekzistas kvar elementoj, instruis ĉiuj filozofoj. Sed li tion negis, por ne veki la impreson, ke li iras laŭ alies spuroj, sed li volis, ke ekzistu aliaj elementoj kiel bazo de la elementoj mem, kiuj nek povas esti vidataj nek per iu ajn parto de la korpo esti tuŝataj aŭ sentataj. 5 "Ili estas tiel malgrandaj" li diras "ke neniu tranĉila tranĉo estas tiel akra, ke per ĝi ili povas esti tranĉataj aŭ dividitaj". Kaj tial li donis al ili la nomon atomoj[11]. Sed se ili ĉiuj havus unu saman naturon, li komprenis, ke ne povus esti realigitaj la malsamaj aferoj en tuta ilia variado, kiujn

## Epikuro (ankaŭ vidu la noton 10)



Epikuro (-341 al -270) (greke; latine, Epicurus) estis helena filozofo de Ateno kiu fondis epikuranismon, unu el la kvin ĉefaj skoloj de helena filozofio. Laŭ Epikuro, la celo de vivo estas trankvilo, kiu estas atingita per la evito de doloro kaj la malevito de plezuro.

Epikuro ne edziĝis kaj vivis simple kun siaj studentoj en la Ĝardeno en Ateno. La Ĝardeno, ĝardeno kaj domo kiujn Epikuro aĉetis, fariĝis la centra lernejo de epikuranismo de -310 al 529.

Epikuro verkis almenaŭ 42 librojn, sed el lia plumo, ni nur havas parton de du libroj kaj kelkajn leterojn.

(Vikipedio)

ni vidas en la tuta mondo. Tial do li diris, ke ili estas ĉu glitigaj ĉu malglataj, ĉu rondaj ĉu kvadrataj ĉu hokecaj.

6 Kiom pli bone estus, se li restus silenta, ol uzi la langon por tiaj mizeraj kaj stultaj aferoj! Mi persone timas, ke oni tenas min por same febromalsana, ĉar mi kredas, ke mi devas refuti tion. Sed tamen mi respondos al li, kvazaŭ ion li asertus.

7 Se la atomoj estas glitigaj kaj rondaj, ili tute ne povas reciproke alfiksiĝi inter si, por kune estigi iun korpon, same kiel se iu deziras kunknedi hordeo-grajnojn en bulon, sed la glitigeco de la grajnoj mem ne permesas, ke ili kuniĝu en mason. 8 Se aliflanke <ili estas> malglataj, kvadrataj kaj hokecaj, tiel ke ili povos kunfiksiĝi, oni povos disdividi ilin kaj tranĉi; ĉar hokoj kaj anguloj necese elstaras, do povas esti forigitaj. Kio povas esti distranĉita aŭ disrompita, tio ja ankaŭ povas esti vidata kaj palpata.

9 "Tiuj atomoj", li diras[12], "en senripozaj moviĝoj ĉirkaŭflugadas tra la malpleno, tien ĉi tien, same kiel ni vidas okazi al polveroj en la sunlumo, kiam tra la fenestron ĝi enmetas siajn radiojn kaj lumon. El ili estiĝas la arboj kaj la herboj kaj la fruktoj ĉiuj, el ili naskiĝas la bestoj, la akvo, la fajro kaj ĉio ajn, kaj poste ĉio ree disfalas en la samajn <atomojn>". Tio estas ebla, dum temas nur pri malgrandaj aferoj. "Sed el ili formiĝis ankaŭ la tuta mondo". 10 Li atingis la kompletan frenezon; nenio ŝajne povas ankoraŭ esti aldonita. Sed tamen li trovis ion por aldoni. "Ĉar ĉio estas nelimigita", li diras[13], "kaj ĉar ne povas ekzisti ia malpleno, neeviteble devas ekzisti sennombraj mondoj". 11 Kia nombro senlima da atomoj do ekzistu, por ke el tiaj etaj aferoj kuniĝu tiaj gigantaj amasoj? Sed unue mi demandas, kio estas ja la racio aŭ la origino de tiaj atomoj. Ĉar se ĉio konsistas el ili, de kie do ni diru ke ili mem estiĝis? Kiu naturo alkondukis tian materion por estigi tiujn nenombreblajn mondojn?

12 Sed al li ni senpune lasu tiujn fantaziaĵojn pri tiom da mondoj; unue ni parolu pri tiu ĉi <mondo>, kie ni estas kaj kiun ni vidas.

Li diras, ke ĉio estiĝas el nedivideblaj korpetoj.

13 Se tiel estus, nenia afero iam ajn bezonus semon pri sia specio; birdoj sen ovoj naskiĝus, aŭ ovoj sen naskigo, same ĉiuj vivaj estaĵoj sen sekskuniĝo; arboj kaj aliaj aferoj kiuj kreskas el la tero, ne havus proprajn semojn, kiujn ĉiutage ni prizorgu aŭ semu. Kial estiĝas el la greno la rikolto, kaj el la rikoloto siavice la greno? Se ĉio estiĝus el kuniĝo kaj kombiniĝo de atomoj, en la aero ĉio ja povus kunkreski, ĉar tiuj atomoj ja flugadas tra la malpleno. 14 Kial sen tero, sen radikoj, sen malsekaĵo, sen semo ne povas formiĝi kaj multiĝi herbo, nek arbo, nek fruktoj? 15 Estas do klare, ke nenio estiĝas el atomoj; ĉar ĉio ja havas sian difinitan karakterizan naturon, sian semon, sian leĝon dekomence.

16 Finfine Lukrecio kvazaŭ forgesis la atomojn, kiujn li defendas, por refuti tiujn, kiuj diras, ke ĉio estiĝis el la nenio; tie li uzas argumentojn, kiuj validus kontraŭ li mem. Li ja diras:

Se ja kreiĝus el la neni', tiam povus el ĉio ĉiu afero kreiĝi, necesus neniuj atomoj[14] kaj iom poste:

Estas kredende: neni' el nenio povas kreiĝi.

Semojn bezonas ĉio kreita, nur tiel kreaĵoj povos disflugi en mildajn fluojn tra la aero[15].

17 Kiu kredus, ke Lukrecio havis sian cerbon, dum tion ĉi li diris kaj ne konstatis, ke li kontraŭdiras sin mem? Ĉar ja estas klare, ke nenio estiĝas el atomoj, ĉar ĉiu afero havas siajn proprajn semojn, krom se eble ni kredu, ke la naturo de fajro kaj akvo konsistas el atomoj. 18 Kiel eblas, kiam kolizias per forta interbatiĝo aferoj de ekstrema malmoleco, ke el tio subite aperu fajro? Ĉu en la fero aŭ la siliko kaŝiĝas atomoj? Kiu enmetis ilin? Aŭ kial ili ne elsaltas eksteren el si mem? Kiel povis daŭre ekzisti fajrosemoj en materio plej malvarma?

19 Ni lasu la feron kaj la silikon. Vitrobulon plenan je akvo se vi tenas en la suno, eĉ ĉe pleja malvarmo pere de la lumo, kiu eliĝas el la akvo, oni povas ekbruligi fajron[16]. Ĉu ni tial kredu, ke eĉ en la akvo enestas fajro? Sed nur per la suno eĉ plensomere ne eblas ekbruligi fajron. 20 Se vi spiras super vakstabulo, aŭ se vaporo ion leĝere ektuŝas, marmoran bovlon aŭ platon, iom post iom el plej etaj eretoj formiĝas akvo[17]. Same el la spirado de tero aŭ maro estiĝas nebulo:



Ebla imago de Leŭkipo

disiĝante ĝi malsekigas kion ĝi kovras, aŭ kuniĝinte en krutajn montojn ĝi suprentiriĝas, densiĝas en nubojn kaj de tie subenĵetas la plejajn pluvadojn. 21 Kie ni do diru, ke estas la atomoj de l' malseko? Ĉu en la vaporo? en la spirado? en la vento? Sed nenio ja povas troviĝi en io, kio ne estas tuŝebla nek videbla.

22 Kion mi ankoraŭ diru pri la bestoj, en kies korpoj nenion ni vidas farita sen racio, sen ordigo, sen utilo, sen beleco, tiugrade, ke la plej planita kaj plej zorga formiteco de ĉiuj iliaj korpopartoj malebligas pensi eĉ pri hazardo aŭ sorto? 23 Sed ĉu ni akceptu do, ke povis kunkreski tiuj membroj, tiuj ostoj, tiuj muskoloj, tiu sango el atomoj? Kiel do statas pri sensoj, pensoj, cerbo, memoro kaj spirito? El kiaj atomoj tiuj povis kunformiĝi? "El la plej etaj", li diras. Ekzistas do ankaŭ pli grandaj. 24 Kiel do ili estu netranĉeblaj? Krome: se la nevideblaj konsistu el nevideblaj partoj, tiam la videblaj aferoj konsistu el videblaj partoj. 25 Kial tiujn do neniu vidas?

Sed la nevideblan, kio estas en la homo, oni ja povas imagi, aŭ la tuŝeblan, kiu kuŝas sub la videbla – ĉar al ambaŭ klare troviĝas racia bazo, kiu ne vidas tion? Sed kiel povas aferoj, kiuj sen ia racio kuniĝas, efiki ion racian? Ni do vidas, ke en la tuta mondo estas nenio, kio ne enhavas en si plej grandan kaj admirindan racian planitecon. Kaj ĉar ĝi superas la homan mensan kapablon, al kiu pli prave oni atribuu ĝin ol al la Dia providenco? 26 Ĉu do bildon aŭ statuon de homo formas racio kaj arto, sed la homon mem ni kredu hazarde formiĝi el pecoj kiuj hazarde kuniĝas? Kio eĉ nur similas al la vero en tiu fantazio, ke la plej

alta kaj plej grandioza artisto povas maksimume imiti la ombron, aŭ la eksterajn formojn de la korpo? Ĉu li kapablus per homa artlerto al sia verko atribui iun movkapablecon aŭ sensumon? 27 Mi ne traktas la uzadon de vido, aŭdo, flaro, aŭ de tiu mirinda laŭceleco de la ceteraj korpopartoj eksteraj kaj internaj: Kiu artisto kapablus formi homan koron, la voĉon aŭ eĉ la saĝecon? Ĉu iu mense sana homo povus kredi, ke – kion la homo ne povas fari per sia racio kaj pripensado – ke tio povus estiĝi per kungluiĝo de hazarda interfrapiĝo de atomoj?

Vi vidas, en kiajn deliraĵojn ili trafas, kiuj la kreon kaj la prizorgadon de l' aferoj ne volas koncedi al Dio. 28 Sed foje ni koncedu al ili, ke ĉio tera estiĝas el atomoj: ĉu same pri ĉio ĉiela? La Diojn ili diras esti nepereemaj, eternaj kaj beataj; nur al tiuj ili donas la privilegion, ke ŝajne ili ne formiĝis el kuniĝo de atomoj. 29 Ĉar se ankaŭ la Dioj estiĝus el atomoj, ili estus pereemaj, kaj la atomoj foje disiĝus ree en sian antaŭan naturan formon. Se do estas io, kion la atomoj ne formis, kial do ne same la ceteran mondon tiel ni komprenu? 30 Sed mi plue demandas: Kial ne konstruis al si la Dioj iun loĝejon, antaŭ ol tiuj praelementoj kreis la mondon? Klare, se la atomoj ne kuniĝus kaj formus la ĉielon, tiuj Dioj ĉiam ankoraŭ ŝvebus en iu vakuo. 31 Laŭ kiu plano, laŭ kiu decido el sia senorda amasiĝo povis do kunveni la atomoj, tiamaniere ke parte sube el ili formiĝu la tero, dum super tiu etendiĝu la ĉielo ornamita per tioma varieco de steloj, tiel ke nenio pli harmonia povus iam ajn esti imagata? 32 Kiu do vidas tiajn kaj tiel gigantajn aferojn, kiu do povas kredi, ke tiuj mirakloj formiĝis sen ajna planado, sen ajna providenco, sen ajna Dia racio, sed nur el plej etaj splitoj kaj eroj? 33 Ĉu ne similas je monstraĵo, ke naskiĝis homo, kiu tion asertis, aŭ ke ekzistas homoj, kiuj tion kredas, kiel Demokrito, kiu estis lia lernanto, aŭ Epikuro, en kiun transfluis la tuta vanteco el la fonto de Leŭkipo?

34 Sed, kiel diras aliaj, la mondo ja estas kreita de la naturo, kiu mem malhavas senton kaj formon[18]. Sed tio ja estas eĉ pli absurda! Se la naturo kreis la mondon, neeviteble tion ĝi faris laŭ iu planado aŭ racio; nur tiu ja faras ion, kiu posedas la deziron aŭ la kapablon fari ion. 35 Se la naturo malhavas senson kaj aspekton, kiel ĝi do povus fari ion kio ja havas senson kaj aspekton? Tiam do oni devus opinii, ke la mirinda kaj tiel subtila konstruo de l' animaloj povus esti farita kaj vivigita de io sen senso, aŭ li devus kredi, ke la karaktero de la ĉielo, kiu tiel providence estas adaptita al la bezonoj de l' vivantaĵoj, subite ekestis pro iu hazardo sen ajna kreinto, sen ajna artisto.

36 Ĥrizipo diras[19]: "Se ekzistas io, kio kreas aferojn, kiujn la homo kun sia racio ne povas fari, tio nepre estas pli granda, pli forta kaj pli saĝa ol la homo.



Demokrito, la Ridanta Filozofo, de Hendrick ter Brugghen - 1628

Nu, la homo ne povas fari la ĉielajn aferojn: tial kio faras aŭ faris ilin, superas la homon en sia fakscio, sia planado, sia kapablo. 37 Kiu do povas esti tio, krom la Dio?” Sed la naturo, kiun ili konsideras patrino de la aferoj, se ĝi ne havas menson, neniam ĝi ion efektivigas, nenion ĝi entreprenas. Sed kie mankas pensado, nek estas iu movado nek estigado. 38 Sed se la naturo bezonas planadon por ion komenci, racion por dismeti, fakscion por realigi, forton por elfini, potencon por regi kaj konservi ĝin, kial tiun naturon oni ne prefere nomu Dio?

39 Aŭ: se la kuntrafiĝo de atomoj aŭ la naturo kiu malhavas menson konstruis ĉion, kion ni vidas, tiam mi demandas[20], kial ĝi ja povis fari la ĉielon, sed urbon aŭ domon ne povis fari, kial el marmoro ja montojn ĝi faris, sed kolumnojn aŭ statuojn ne povis fari. 40 Ĉu tiuj atomkombiniĝoj ne ankaŭ tion ĉi devus realigi, se neniun aranĝon ili devus lasi sen elprovi ĝin? Ĉar pri la naturo kiu malhavas menson oni ne devus miri, ke ĝi forgesis krei tion.

41 Kiel do statas? Dio do entreprenis ĉi verkon de la mondokreo, aferon, ol kiu nenio pli laŭplanada, nenio pli laŭcelada, nenio pli bela kaj nenio pli ampleksa povas ekzisti; kiun Li mem do kreis, ĉar la homo neniam povis ĝin fari, inkluzive de la homo mem. Al li Li atribuis etan eron de sia saĝeco kaj provizis lin per iom da racio, kiom lia rompiĝemo povis elteni, por ke li mem faru la bezonaĵojn por sia uzado. 42 Se tamen en ĉi – tieldire – monda respubliko ne estas ia Providenco, kiu regas, neniu Dio, kiu gvidas, kaj se entute neniu senso agas en tiu ĉi naturo, de kie do oni kredu, ke devenis la homa menso kiu tiel aktivas, kiu estas tiel inteligenta? 43 Se la korpo de la homo ja estas farita el humo, de kio la homo ricevis sian nomon[21], la <homa> animo, kiu estas saĝa, kiu estas la reganto pri la korpo, al kiu obeas la membroj kvazaŭ al reĝo kaj imperiestro, kiu nek povas esti vidata nek komprenata, ne povis veni en la homon krom el saĝa naturo[22].

44 Sed kiel menso kaj animo regas ĉiun korpon, same la mondon <regas> Dio. Estas ja ne verŝajne, ke malpli grandaj kaj malpli gravaj aferoj havu regadon, sed la pli grandaj kaj la pli gravaj ne havu tion.

45 Fine ankaŭ Marko Cicerono skribis en siaj Tuskulaj Diskutadoj [23] kaj en sia Konsolo: “Nenie surtere eblas trovi la originon de la animoj. Ĉar en la animo nenio estas miksita kaj kunmetita; nenio estas tie, kio ŝajne estas naskita aŭ farita el la tero, eĉ ne io humida, aera aŭ fajra. 46 Ĉar en tiuj elementoj estas nenio, kio havas la kapablon de memoro, menso aŭ pensado, kio retenas la pasintaĵon kaj antaŭvidas la estontajn kaj povas ampleksi la nuntempon: ĉio ĉi estas nur Dia; kaj neniam io estos trovita, el kio ĝi povas veni en la homon, krom de Dio.”

47 Se escepti du aŭ tri vantajn mensogulojn, estas do certa fakto, ke la Providenco regas la mondon, same kiel ĝi ankaŭ estis kreita <de li>; kaj neniu kuraĝas preferi la opinion de Diagoro kaj Teodoro, aŭ la sensencan elpensaĵon de Leŭkipo kaj Demokrito antaŭ la sep plej unuaj filozofoj, la tiel nomataj Sep Saĝuloj, antaŭ Pitagoro, Sokrato, Platono kaj la ceteraj grandaj filozofoj, kiuj ĉiuj jesis la ekziston de l’ Providenco. Tial do falsa estas tiu opinio, laŭ kiu saĝuloj

organizis la religion por terori kaj timigi, por ke tiel la senspertaj homoj detenu sin de pekoj. 48 Se ili pravus, ni do estus traktataj pulĉinelo de la praaj saĝuloj. Se ili ja elpensus la religion por trompi nin kaj eĉ la tutan homan genton, ili sekve ne estis saĝuloj, ĉar mensogo ne rilatas al saĝulo. 49 Sed tamen ili estu ja saĝuloj: kiel grandioze trafa mensogado, ke ne nur sensciulojn ili tiel facile povus mistifiki, sed ankaŭ Platonon kaj Sokraton ili trompu, kaj Pitagoron, Zenonon, Aristotelon, gvidantojn de la plej gravaj skoloj!?

50 Ekzistas do Dia Providenco. Ĉiuj, kiujn mi nomis, estis pri tio konvinkitaj: de ties forto kaj potenco ĉio, kion ni vidas, estas kreita kaj regata. 51 Ĉar tiu amplekso de l' universo, tiu ordigiteco de la aferoj, tiu konstanteco ĉe observado de reguloj kaj tempoj, neniam povis estiĝi sen prizorganta artisto, nek povis plu ekzistadi dum tiom da jarcentoj sen potenca loĝanto, nek povis esti regata poreterne sen sperta kaj klera ĉefo: tio estas simple afero de racio. 52 Ĉar ĉio kio havas racion, nepre devas deveni el racio. Nu, la racio apartenas al la sentanta kaj saĝa naturo; sed la saĝa kaj sentanta naturo ne povas esti io alia ol Dio. Ĉar do la mondo havas racion, de kiu ĝi estas regata kaj pro kiu ĝi ekzistas, ĝi do estas farita de Dio. 53 Se nun la kreinto kaj reganto de la mondo estas Dio, do la religio prave kaj ĝuste estas establita. Ĉar al la kreinto de ĉio, la komuna Patro, honoro kaj adorado estas ŝuldata.

Notoj


[9] Ni uzas ĉi tie por simpligi la vorton *atomo*, kvankam povus esti *semo* aŭ *baza materialo* aŭ io alia.
[10] Leŭkipo ĉ 450 a.Kr., iniciatinto de la antikva atomteorio kaj mekanika interpreto de la mondo. Pli fama tamen estas lia lerninto Demokrito (ĉ 460-380). Li fariĝis la plej fama reprezentanto de l' atomteorio; Epikuro (341-271/270) kaj ties skolo transprenis liajn ideojn. Por Laktancio, Epikuro estas la ĉefa kontraŭulo. Epikuron Lukrecio (vidu *Antologio Latina* 1) konsideris kiel iaspecan savanton de la homa gento el la timo antaŭ la Dioj.
[11] Greke por: netranĉeblaj.
[12] Lukrecio – 2:114 k.s.
[13] Lukrecio – 2:1048 k.s.
[14] Lukrecio – I:159-160.
[15] Lukrecio – I:205-207.
[16] Tio funkcias kiel lenso.
[17] Lukrecio 6:470 k.s.
[18] Cicerono - De Natura Deorum, 1:53; 1:35.
[19] Cicerono – De Natura Deorum 2:16; 3:18; 3:25.
[20] Cicerono – De Natura Deorum 2:94.
[21] Homo el humo – simila vortludo kiel la Hebrea biblia vortludo inter Adam kaj adamah'.
[22] Por Laktancio do: el Dio.
[23] Cicerono – Tuskulaj Diskutadoj 1:66; Konsolo fragmento 13.

# Informoj

## Ĵus aperis

### ANTOLOGIO LATINA volumo 5
### Frua Kristanismo

de Gerrit BERVELING
ĉe Eldonejo Fonto




La antologio enhavas tekstojn de la frua kristanismo ĉ 200 - ĉ 350 p.Kr. En la antologio vi trovos inter alie tekstojn de Tertuliano, Cipriano, Novatiano, Arnobio kaj Apokrifaj evangelioj. Vi jam renkontis kelkajn teksto-ekzemplojn en antaŭaj numeroj de Dia Regno.

---

## Ŝatata sveda antaŭ-fasta manĝaĵo



Jam post Kristnasko la bakistoj vendas bakaĵon farita el tritika faruno kaj plenigita de batita kremo kaj migdal-sukera miksaĵo. Ĝi havas plurajn nomojn, inter alie *semla* (el la latina vorto "simila" t.e. tritika faruno, komparu la germanan "Semmel"). La unua nordeŭropa bildo, kiu montras la tritikan bulkon, troviĝas en dana preĝejo. La bildon oni datigas al la jaro 1250. La *semla* iom post iom ŝanĝiĝis en formo kaj gusto. Origine oni manĝis *semla* nur la Grasan Mardon antaŭ la Cindra Merkredo kiu komencas la Karesmon, sed post 1960 tiu regulo malaperis. Nuntempe en Svedio oni manĝas jare 40 miljonojn da *semla* inter decembro kaj Pasko.

Estimataj, jen mi invitas vin al novaj

# ekumenaj Bibliaj Tagoj kun Adoru!

www.ikue.org/cz/tuchomerice/tuchomerice.htm

En 2014, ili okazos proksime de Prago en urbo Tuchoměřice [Tuĥomjerĵice], de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo (merkrede de la vespermanĝo ĝis dimanĉe post la tagmanĝo.)

**La Loko**
La iama kastelo, nuna klostro Tuchoměřice, Školní 1, 25267 Tuchoměřice apud Prago. La loko estas facile atingebla ne nur per **aŭto**, sed ankaŭ per **trajno** kaj **eŭropaj lini-busoj**, ĉar el la centro (ekz. de la stacidomo) de Prago ekzistas linioj de publika trafiko. Eĉ per **aviadilo** estas facile: La flughaveno de Prago estas tre proksima. Ne ekzistas rekta linio al Tuchoměřice, sed la membroj de la komunumo diris, ke eblas sendi aŭton de la kastelo al la flughaveno por venigi partoprenontojn. En la klostro loĝas kaj gastigas de kelkaj jaroj la francdevena juna movado "Chemin Neuf" (Nova Vojo). La loĝado estas simpla, sed bona. (Eblas sendi la fotojn, se iu volas vidi.) Ni antaŭmendis 15 ĉambrojn (kun entute 38 litoj), el kiuj 8 havas propran lavabon. Kiu *nepre* bezonas unuopan ĉambron, aŭ pli da lukso, tiu povas ankaŭ mendi ĉambron en hotelo "Auberge de Provence" (www.tuchomerice.cz), je piedira distanco de 5 minutoj. En aliaj kazoj, skribu viajn dezirojn aŭ bezonojn, kaj mi provos plej bone aranĝi, laŭ interkonsento kun vi.

**La Prezoj**
Por la tuta seminario, la kompleta prezo estas 140 € por okcidentlandanoj kaj 120 € por orientlandanoj (manĝoj, tranoktado, programo). Se iu ne tranoktos en la klostro, sed manĝos kun ni, tiu pagos 96 € resp. 76 €, sed devos mem prizorgi la tranoktadon. (En la menciita hotelo, la kostoj por unu nokto estas 70 €/nokto, do entute 280 € por tranoktado.) Por aliĝi, simple sendu aŭ rete aŭ papere viajn informojn. Por validigi la aliĝon, okcidentlandanoj ĝiru 40 € (orientlandanoj: 20 €) al la Konto 62 42 548 541 ĉe Volksbank Hellweg e.G., BLZ 414 601 16. La reston oni pagu surloke! Atentu: De post la 31-a de januaro, ekfunkcias la nova t.n. SEPA-sistemo de ĝirado kaj la bankaj datumoj estas:
IBAN: DE82 4146 0116 6242 5485 41.
BIC: GENODEM1SOE.

**La Programo**
enhavos prelegojn pri Biblia temo, Diservojn kaj kantojn E-lingvajn. Ni multe utiligos kaj la Biblion, kaj la ekumenan kant- kaj preĝlibron Adoru. (Kiu ne havas ĝin, diru tion, por ke mi kunportu sufiĉe da ekzempleroj.) Kompreneble ni ekskursos ankaŭ komune al la Praga centro. Ankaŭ el ekumena vidpunkto, Prago estas tre interesa urbo. Mi esperas ke la invito interesos vin, kaj ke vi havos eblecon veni. Aliĝu prefere baldaŭ. Se restis demandoj, ne hezitu min kontakti!

Stefan Lepping
Mellinstr. 5; 59457 Werl
stefanlepping@gmx.de

# Jen, esti hejme mia vol’

## ICH WOLLT, DASS ICH DAHEIME WÄR




3. Nun ek, animo, al prepar’!
Atendas vin la anĝelar’.

4. Tro etas eĉ la tuta mond’
kompare al ĉiela rond’.

5. Ĉiele estos viv' sen mort’,
nur ĝoj’, kaj sano sen malfort’.

6. Mil jaroj estos unu tag’,
sen pek’, ĉagren' aŭ ajna plag’.

7. La Bonon super ĉia bon’
vi serĉu ĉe la Dia tron’.

8. Alia bon’: nur eta rav’.
Ek! Hejmen do! Al via sav’!

9. Ĉu morgaŭ? Ĉu hodiaŭ jam?
Ne gravas! Gravas nur la Am’.

10. Restados vi neniel ajn.
Do fuĝu el ĉi trompa ŝajn’.

11. Vi pentu, amu kun fidel’,
kaj pretu iri al ĉiel’.

12. Adiaŭ, mond’! Vin benu Di’.
Ĉielen nun foriras mi.

ICH WOLLT, DASS ICH DAHEIME WÄR • EG 517 • M: Strasburgo 1430 • germana T: Heinrich von Laufenberg 1430 • E: Albrecht Kronenberger 2014-01-26